

Numero: 224.  
Januaro 2011.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

# VESPERTO



Redaktanto:  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár  
Béla király u. 44.  
H-7400 HUNGARIO  
Telefono: 82/ 410-664  
Retadreso: [espbela@t-online.hu](mailto:espbela@t-online.hu)  
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro  
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

# ESPERANTO?

Kio okazos al vi Esperanto? Apenaŭ pasis kelke da tagoj el la nova jaro kaj en retejo mi legis, ke kelkaj miaj samlandanoj kiom atakas vin.

Por mi estas strange, ke ili kial atakas vin. Ni hungaroj apenaŭ scias fremdajn lingvojn. Nepre ni bezonas helpilon per kiu ni povos navigi sur la oceano de la lingvoj.

Ili argumentas: sufiĉe scii la anglan kaj solviĝis ĉiuj lingvaj malfacilaĵoj en la mondo, kaj ĉefe ni hungaroj lingve estos egalrajtaj.

Se efektive la angla lingvo estus tiom granda trezoro por la komunikado inter la diverslingvaj homoj, tiam ni unuanime elektus ĝin.

Sed oni scias, tiu ĉi lingvo kun aliaj mondlingvoj kiel disvastiĝis tra la tuta tergloba. Ne por ĉiu homo kaj popolo ĝi estas tiom kara komunikilo, ĉar dum jarcentoj ĝi disvastiĝis per milito kaj la subpremo de la lingvoj kaj kulturoj.

Ĉu ni jam forgesis nian lingvan batalon kontraŭ la germana lingvo. En la dekaŭa jarcento ankoraŭ la germana estis la oficiala lingvo, kaj en Budapeŝto en la ĉefurbo de Hungaro ekzistis nur germana teatro.

Ĉu por ni nunaj hungaroj estus bone, se fermiĝus la hungarlingvaj teatroj kaj anstataŭ ili sur la scenejo estus aŭdebla nur angla parolo.

Kompreneble mi ne estas kontraŭ la lingvo de Ŝekspiro. Mi nur ŝatus tian duan lingvon por ni hungaroj, kiu estas neŭtrala kaj facile ellernebla.

Kion fari por defendi nian nacian lingvon kaj kulturon?

La lingvo de iu nacio vole nevole kaŭzas lingvan imperialismon subpremante aliajn lingvojn.

Grave estas la lingva egaleco. Estus bone, se ni jam komprenus, ne ekzistas grandaj kaj etaj lingvoj. La lingvon ne influas la nombro de la parolantoj. Se iun lingvon parolas nur du homoj, ĝi estas same tiom grava, kiun parolas milionoj da homoj. Malbona argumento eterne ripetadi, iun lingvon parolas centmilionoj kaj tial ĝi povas ĝui privilegecon.

Naciaj lingvoj ne povas esti neŭtralaj. Kiam oni komencas lerni iun nacian lingvon, tiu elproprigas ankaŭ ĝian kulturon. Tiam estas problemo, se tio jam superas la gepatran lingvon.

En la kazo de Esperanto tio ne povas okazi, ĉar ĝi estas ĉies lingvo kaj tial ĝi apartenas al neniun nacian.

Laŭ mi Esperanto povos fariĝi en la estonto la dua gepatra lingvo de homaro.

-Redaktanto-



## Petro lernas la lingvon Esperanton Petro lernas la lingvon Esperanton

**Nuntempe en hungario multaj gestudentoj elektas Esperanton por akiri diplomon. Ankaŭ Petro estas tia junulo kun kiu mi babiladas.**

*Kiel vi opinias pri la Zamenhofa lingvo? –mi demandas de li.*

Petro estas dudek du jara hungara junulo, kiu antaŭ nelonge komencis lerni Esperanton. Li vizitas pedagogian altlernejon kaj baldaŭ li fariĝos mezlerneja instruisto. Je mia demando li eklevas siajn grandajn okulojn kaj diras:

*Pro la diplomo mi elektis Esperanton. Antaŭe tiu ĉi lingvo ne interesis min, eĉ se tiam mi ekaŭdis, ke iu lernas tiun ĉi lingvon mi priridis lin. Certe vi scias, en Hungario nur tiu ricevas diplomon, kiu faras almenaŭ unu mezgradan ŝtatan lingvoekzamenon el iu fremda lingvo.*

*Longe mi cerbumis, kiu lingvo estu elektita? En la lernejo mi lernis germanan kaj iom la anglan lingvojn. Mi estis ĉiam maldiligenta lernanto. La unua penso estis pliperfektigi mian lingvoscion el la germana lingvo, sed baldaŭ mi sentis kaj konsciis, el tiu ĉi lingvo mi ne povos fari ekzamenon. Mia germana lingvoscio ankoraŭ bezonas almenaŭ du - tri jarojn. La tempo urĝigis min. Kiun lingvon mi scipovus ellerni dum kelkaj monatoj. Tiam mi pensis, tia lingvo ne ekzistas. En la lasta momento mia konatulo esperantista proponis al mi lerni Esperanton. Mi dubis, ke mi estos kapabla ellerni ĝin dum tri monatoj. Sed li parolis kaj parolis. Mia konatulo promesis, ke li helpos en la lernado, eĉ ni kune prepariĝos al la lingvoekzameno. Fine de novembro mi komencis lerni ĝin. Mi ne tro kredis en la sukceson. Komence mi opinis, ke la lernado estos tempoperdo, kaj malgraŭ la lernado mi ne povos fari lingvoekzamenon.*

*Ni rapide lernis kaj jam en la unuaj lernohoroj mi spertis, kiom facila estas tiu ĉi lingvo. Sed ankoraŭ tiam mi ne kredis la sukceson. Silvestre al mia konatulo japanaj geesperantistoj alvenis. Aŭskultu min, okazis miraklo! Apenaŭ mi komencis lerni Esperanton, sed mi povis komuniki iomete kun la japanoj. Mi miris, mia konatulo kiom facile kaj elegante parolas en tiu ĉi lingvo. Dum la amika renkontiĝo mi decidis, ke post la lingvoekzameno mi restos esperantisto kaj klopodas kontakti kun eksterlandaj geesperantistoj.*

Ŝajnis, ke li serioze pensis tion. Mi deziras al Petro, ke la mezgrada, ŝtata lingvoekzameno sukcesu kaj liaj sonĝoj realiĝu en Esperantujo.

-Andriŝ-



## La sekreto de kapelo

Estis noktomeze. La vilaĝeto estis silenta. Ĉiu dormis, ĉar la vilaĝanoj frue enlitiĝas. Ili jam kun la Suno vekigis, ĉar ilin atendas la laboro sur la kampo.



En la malproksimo hundo ekbojis, sed baldaŭ ĝi mutiĝis.


Denove iĝis silento en la vilaĝo.

Ĉe la vilaĝfino du viroj paroladis. Ilia voĉo estis ekscitita. Pro la malhelo ilia vizaĝo ne estis videbla.

-En tiu direkto troviĝas la kapelo – montris dekstren la pli alta viro – Ĉu vi estas preta por iri tien?

La alia ne respondis tuj. Sekvis longa silento ĝis li diris:

-Jes, sed mi timas iom. Eble ĉi entrepreno estos tro riska. Kiel vi opinias?



-Kial timi? Nun almenaŭ ni ekscios la sekreton. Nu, ni iru!

-Tamen tio estas danĝera. Dio scias kio okazos tie?

-Ne timu! Post duonhoro ni denove estos hejme.

Ili ekiris al la direkto de la kapelo.

Iom fore de la vilaĝo estis malgranda kapelo forlasita. Onidire en ĝi ĉiunokte sorĉistinoj faras magiajn aferojn. Dum tiaj sorĉoj la partoprenantoj povas transiri en aliajn dimensiojn kaj faras interesajn vojaĝojn en spaco kaj tempo.

Sed pri ĝi neniu kuraĝis konvinkiĝi. En la vilaĝo oni nur flustradis pri la sekreto de la kapelo.

La viroj tute hazarde aŭdis pri ĝi. Ili venis el la proksima urbo, kaj ili decidis malkaŝi la sekreton.

Luno prilumis al ili la vojeton. Ili malrapide proksimiĝis al la forlasita konstruaĵo.

Kio atendos tie ilin?

Eble ĝi estas nur legendo kaj krom kelkaj meblaĉoj ili trovos nenion.

La silento estis timiga. Ankaŭ iliaj pensoj estis aŭdeblaj.

Post dekminuta marŝado ili atingis la kapelon. Ili tuj ne kuraĝis iri tien rekte. De ĝi ili haltis kaj kaŝiĝis malantaŭ granda arbusto.

-Mi vidas nenion – diris nerveze la pli alta – Ĉu vi vidas ion?

-Nenion – venis la mallaŭta respondo.

-Ni devos iri pli proksimen, ĉar tie ĉi ni vidas nenion.

-Ĝi estas tro danĝera – argumentis la alia viro – ni iru hejmen!

-Ĉu vi stultiĝis? Ni estos pririditaj, se nun ni iros hejmen. Ni devas konvinkiĝi, kio okazas en la kapelo.

-Rigardu, ĉio estas silenta kaj mi vidas nenion. Iru hejmen!

-Mi restas tie ĉi kaj tuj mi iros en la kapelon – kaj li ekiris tra mallarĝa kampo.

Lia amiko ŝtoniĝante rigardis lin, kiel tiu malaperis de antaŭ liaj okuloj. Fine kolektante kuraĝon ankaŭ li ekiris.

-Ĉu tamen vi sekvis min? – ridis moke la pli alta viro – Ene mi vidas palan lumon. Iu estas en la kapelo. Se efektive vi timas, nun ankoraŭ vi povas forkuri. Ĉu vi restos aŭ foriros?

Li restis, sed tre tremis.

En la kapelo vidiĝis blua koloro sur la pavimŝtono. Ene estis videbla neniŭ. Tio kuraĝigis ilin kaj ili eniris la kapelon.



Ene ilin kaptis ekterordinara sento. Ili ne povis liberiĝi de la blua koloro. Ĝi forte tiris ilin al si. Vane ili ekprovis liberiĝi de tiu ĉi mistera forto, ili ne povis.

Fine ili jam staris tute proksime al ĝi.

-La lumo ensuĉos nin – kriis panike la pli malalta viro, kiu ĝis nun ege timis kaj li volis forkuri, sed pro io li ne povis.

Li pravis, ĉar en la sekva momento la blua lumo ensuĉis ilin kaj komencis fali en nekonatan abismon.

Por ili la falo ŝajnis senfina. Kvazaŭ dum tio jarmiloj forflugus preter ili.

Tremante ili alvenis ien. Ili ne sciis, kie ili estas. Ilin ĉirkaŭis plu blua koloro, sed ekster ĝi estis mirakla mondo.

Kvazaŭ ili estintus en la ĉielo. Ili ne sciis, ĉu ili vivas aŭ mortis.

-Kie ni estas? – ili demandis samtempe – Kien malaperis la kapelo?

Kompreneble ili ne ricevis respondon. Se ili ne volis resti tie por ĉiam, tiam ili devis ekiri por malkovri ĉi strangan mondon, kien ili alvenis.

Ili elpaŝis el la kupolo de la blua koloro kaj ili ekiris.

Vere ili ne sciis en kiun direkton iru, ĉar ĉie ili vidis nur vastan floran kampon. Ĉio havis akran koloron, kiun ankoraŭ ili ne vidis.

Fine la pli malalta viro demandis timeme:

-Kiel ni hejmeniĝos?

-Tion mi ne scias. Ankaŭ por mi ĝi estas granda enigmo.

Ili longe iris sur la vasta kampo, dume ili serĉis homon, kiu povus klarigi al ili, kio estas tiu ĉi bela, sed interesa mondo.

(-daŭrigota-)

# Poezio

## Alberto de Oliveira Vintra nokto

La vintro akre en l' ekster' blovante  
La nokton malbeligas, kaj konstanta  
La vento daŭras, l' arbojn kurbigante,  
Kaj vundas ilin kiel sag' siblanta.

La aĵojn de la spac' malvarmigante  
La nokta pluvo falas, kraketanta,  
De tie ĉi aŭdebla, tamburante  
Sur la vitaĵoj, iom hezitanta.

Dum tio, mia amo, mi relegas  
Leterojn viajn, kie l' amovento  
Animon vian en revar' levegas.

Mi pensas vidi, kun spirita ĝu',  
La lunobrilon sur la firmamento  
De l' noktoj, kiuj ne revenos plu!



## Imre Szabó: *Vojaĝo eterna* (Kantoteksto)

Vojaĝo eterna:  
animo animon  
ĉasas konstante  
por gajni intimon.

La leĝo eternas,  
kaj ni ne esceptas,  
kvankam ni foj-foje  
alie perceptas.



## Julio BAGHY Siberia lulkanto



Hirte flirte flugas haroj,  
siblas vintra vent'...  
Morde torde ŝiras koron  
larmoj kaj la sent'...  
Kant' patrina plore sonas,  
dormas filo en lulil'...  
Noktripozon por li donas  
sono' infana en trankvil'...  
"Baju, baju, bajuŝki...  
Dormu sonĝe, dormu vi...  
Ĝemo, ploro kaj dolor'  
flugu for de via kor'!  
Baju... baju... bajuŝki...  
Dormu filo, dormu vi!"

Brue skue blekas vento,  
knaras ligna dom'...  
Ĝeme treme sin forkaŝas  
besto kaj la hom'...  
Vent' alportas sangan krion  
tra l' glacia neĝa val'...  
Lastaspire petas Dion  
preĝ' de l' patro en batal'...  
"Baju, baju, bajuŝki...  
Ho, fileto, dormu vi...  
Kri' de l' morto, son' de l' plor'  
flugu for de via kor'!  
Baju... baju... bajuŝki...  
dormu filo, dormu vi!"

Prude krude fremdaj homoj  
venas el insid'...  
Trompe rompe sangtriumfe  
venkas la perfid'...  
Kant' patrina plore sonas,  
dormas filo en lulil'...  
Tran pacon por li donas  
sort' de l' patro en trankvil'...  
"Baju, baju, bajuŝki...  
Koro mia, filo, vi...  
Anĝelete, pala roz'  
dormu pace en ripoz'!  
Baju... baju... bajuŝki  
dormu nur eterne vi!..

# Por infanoj



## AVENTUROJ EN ESPERANTUJO

Tria ĉapitro



La hundeto ekbojis, kvazaŭ ĝi komprenus ilin. Nun jam ili triope daŭrigis la promenon en la urbo.

Ili vizitis multajn lokojn en la urbo. Ili admiris la belegajn montrofenestrojn de la magazenoj kaj vendejoj.

Se oni fartas bone, tiam ne rimarkas, kiel rapide pasas la tempo.

Baldaŭ vesperiĝis kaj ili malsatiĝis. La du vagabundoj ne sciis, kiel reiri al la lernejo, kie jam certe ili estas serĉitaj.

Kristina ekploris:

-Mi estas tre malsata. Krome mi jam malvarmas. Peĉjo, ni reiru!

Ankaŭ Peĉjo ektimis kaj malĝoje diris:

-Ankaŭ mi estas malsata. Mi ne scias kiel reiri. Mi misvojis.

-Eble la hundeto scias, kie troviĝas la lernejo? Ja ni renkontis ĝin proksime al ĝi – ekbrilis la okuloj de la knabino.

Ili ambaŭ turnis sin al la besto kaj samtempe ili demandis:

-Hundeto, ĉu vi povus gvidi nin al la lernejo?

La fidela besteto ekvostumis kaj ĝi komencis saltadi. Eble tio signifis en hundolingvo, ke ĝi konas la vojon.

La etuloj sekvis la hundon, kiu kurante ekiris.

Jam estis tute malhela, kiam ili alvenis al la konata konstruaĵo de kie ili ekiris. Ili forgesiĝis nur tio, ke vespere jam neniu estas en la lernoĉambroj. La tuta domo estas senhoma. La gelernantoj kaj geinstruistoj ĉiuj iris hejmen.

Peĉjo kaj Kristinjo kun la hundeto senkonsile staris antaŭ la lernejo, kies pordego estis ŝlosita. Ili ne povis eniri. Eĉ ankaŭ la strato estis senhoma, ĉar jam estis malfrue.

Nun kion fari? Ili ne sciis.

Nur la hundeto estis trankvila. Kiam ĝi vidis, ke ili ne povas eniri ĝi denove komencis saltadi kaj proponis sekvi sin.

-Kien vi iras? – demandis mire Peĉjo

La hundeto nur saltadis kaj ekkuris antaŭen. El ĝi ili ekkomprenis, ke ĝi deziras ion. Lace kaj malsate ili sekvis ĝin.

Ili longe iris tra senhomaj stratoj kaj placoj. Ili apenaŭ renkontiĝis kun homoj. Tiu ĉi urbo estis tro paca kaj silenta



La geknabojn jam nenio interesis. Ili havis nur unusola deziro, rapide enlitiĝi kaj dormi. Jam ankaŭ la malsato ne torturis ilin.

Post longa irado la hundeto haltis antaŭ malnova teretaĝa domo. Ĉirkaŭ ĝi estis granda ĝardeno kun multaj arbustoj kaj arboj. Ilia eta amiko denove ekbojis, kio certe tion signifis, ke ili alvenis.

Peĉjo timeme malfermis la ĝardenan pordon. Bonŝanĉe ĝi ne estis ŝlosita. En Esperantujo oni ŝlosas sian domon nur malofte. Ĝenerale la pordoj kaj pordegoj estas malfermitaj antaŭ la gasto.

Tiel ili facile povis eniri kaj trairis la ĝardenon, kie ilian nazon ektiklis la bonodoro de la floroj. Certe la domanoj tre ŝatas la florojn.



La domo estis bele prizorgita. Ĉie estis ordo, tion la infanoj rimarkis ankaŭ en la pala lumo de Luno.

Ili ekfrapetis sur la lignopordo.

Longe nenio okazis. El la domo ne aŭdiĝis bruo, kvazaŭ neniu estus ene.

Sed proksimume unu aŭ du minutoj lumeto eliĝis tra la fenestro kaj baldaŭe raŭka, maljuna voĉo demandis:

-Kiu vi estas?

-Peĉjo kaj Kristinjo – ili respondis – ni misvojis kaj petas vian helpon. Hundeto gvidis nin al vi.

-Ĉu hundeto? – aŭdiĝis denove la voĉo el la domo – Certe ĝi estas Bonamiko. Hodiaŭ antaŭtagmeze ĝi malaperis. Ĝi estas mia hundeto. Ĝi tre ŝatas vagadi en la urbo.

Dume la pordo de la domo malfermiĝis kaj elvenis iom dormema maljunulo.

-Bonan vesperon oĉjo! – ili salutis la maljunan viron dece.

-Estu salutate karaj miaj! Bonvolu enveni mian dometon – akceptis bonkore la maljunulo – Rakontu al mi, kio okazis al vi, kaj kiuj vi estas? Mi scias nur tion, ke vi misvojis malfrunokte kaj mia hundeto Bonamiko gvidis vin al mi. Ĉu ne?

-Jes – komencis rakonti ilian historion la du geknaboj. La maljunulo interesiĝante aŭskultis ilin.

(-daŭrigota-)



# Gajaj bildoj



-Mia lasta deziro, ke ankaŭ sinjoro ekzekutisto lernu Esperanton!

# Gajaj bildoj



Ĉi somere ni estis en Esperantujo



-Kie estas la Plena Ilustrita Vortaro?



-Trankviliĝu, mi nur alportis leteron al via mastro de lia esperantista amiko!



-Ĉu vi ankoraŭ ne parolas Esperanton?



-Mi ŝatas la verdaĵojn, do mi estas esperantisto.